Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago №6, Junio, 2008

Kara leganto, vi denove rigardas la vican numeron de nia bulteno kaj, espereble, ekĝuos ĝin. Nian E-kolektivon julie atendos dua tradici(et)a aranĝo. Vi povas demandi, kiel kun sufikso -et-? Ĉar se Zamenhofa bankedo estas vere tradicia dum multaj jaroj, somera pikniko estis renovigita nur pasintjare. Sed nepre venu, estos vizitantoj el kelkaj aliaj ŝtatoj, krom Ilinojo. Due, nun nian bultenon oni legas en kelkaj aliaj E-grupoj el ĝemelurboj de Ŝikago – en antikva Ateno (Grekio) kaj araba Amano (Jordanio). Baldaŭ ĝi estos legata sur ĉiuj ses kontinentoj! Kaj trie, la lastan kunsidon partoprenis gasto el Pollando – Adamo (vidu la foton kaj legu leterojn) kaj lerte kondukis nin tra la historio de ŝikagaj stratoj nia sekretariino Gertrude (vidu la foton kaj legu suban raporton). Do, ek!

Historio de ŝikagaj stratnomoj

Gertrude Novak

Hodaiŭ vi estos informitaj pri la nomigado de stratnomoj en nia urbo kaj pri ilia planado, kiu estas geometria kaj racia.. Certe vi estas konscienca, ke nun ekzistas krado de interkruciĝantaj stratoj (nord-sudaj kaj okcident-orientaj) kun kelkaj gravaj oblikvaj avenuoj kiel Lincoln, Milwaukee, Ogden ktp. Nuntempe, se vi konas kaj komprenas la bazajn principojn de strat-planado, vi neniam perdiĝos en nia urbo, Ŝikago.

Por kompreni la komenctempajn problemojn, oni devas esti konscia pri la geografio, fokusita je la rivero: la ĉefa rivero ne estas longa, ĝi trapasas inter lago Miŝigano kaj la kunfluo de siaj norda kaj suda branĉoj. Tio rezultiĝas je apero de tri klaraj urbaj tersekcioj: norda, suda kaj okcidenta. Nun oni devas mencii, ke la ŝtato Ilinojo estis fondita en 1818, (ŝtat)distrikto Cook (kuk) – en 1834 kaj la urbo mem – en 1837. En la frua tempo (ĉ. 1830), kiam Ŝikago havis nur 300 loĝantoj, oni ordonis James Thompson-n komponi rektlinian geometrian planon, sed ĝi kovris nur malgrandan areon, pr. 1 kvadratan mejlon. Dekomence tio estis racia ideo, kiu, bedaŭrinde, ne taŭgis por ĉiuj vojoj. La urbo pligrandiĝis al ĉ. 4000 strat-mejloj kun multaj evoluantaj konfuzoj. La stratoj estis plu nomataj laŭ famo kaj pov(eg)o de personoj (ofte – elektitaj politikistoj). Sekve, aperis diversaj stratoj kun la sama nomo, inter ili 17 Lincoln; aliaj havis diversajn nomojn laŭ sia longeco. Kaj, kompreneble, la urbo mem plivastiĝis pro anekso de apudaj urbetoj kaj vilaĝoj. Pro multaj kialoj, kiel nekontrolita numersistemo, egoismo de politikistoj, pligrandigo de la urbo, finfine ekaperis grandega konfuzo. Tial, en 1901 aperis viro, Edward Brennan, kiu proponis necesan inteligentan idearon: (1) numerado de ĉiuj stratoj komenciĝus de "nulaj" State kaj Madison; (2) para kaj nepara numero signifus specifan flankon de stratoj; (3) ĉiu kvartalo enhavus 100 domnumerojn kaj 1 mejlo konsistus el 8 kvartaloj. Pro diversaj malfacilaĵoj tiu koncepto estis oficiale akceptita fare de urbestraro iom poste, en 1908. Post 5 jaroj J. Brennan instigis, ke ĉiu strato havu nur unu nomon, eĉ se ĝi estu interrompita. Plie, li proponis alfabet-sekvantajn nomojn por nord-sudaj stratoj. Alloke, en tiu tempo pli ol 300 stratoj ricevis novan nomon. Por ekscii ion pli, nepre vizitu kunsidojn de nia E-societo!

■UK en Bjalistoko

En septembro 2008 ĉiuj legantoj de la prestiĝa pola tutlanda ĵurnalo Gazeta Wyborcza ricevos kun la gazeto ankaŭ kompakt-diskon kun kurso de E-o kaj ampleksa prezento de la E-movado. La diskon laŭ mendo de la urbo Bjalistoko produktos la teamo de E@I (ikso.net), kaj la eldonon financos la urbo mem. La eldono de la disko estas parto de granda informa kampanjo pri Esperanto, iniciatita de la urbo Bjalistoko lige kun la UK, okazonta en la naskiĝurbo de Ludoviko Zamenhof en 2009. Tadeusz Truskolaski, la urbestro de Bjalistoko, multe aktivis por ke la UK markante la 150-an jubileon de Ludoviko Zamenhof okazu ĝuste en ties naskiĝurbo. En Jokohamo la 9-an de aŭgusto la estraro de UEA decidis, ke la jubilea kongreso okazu en Bjalistoko. La urbestro de Bjalistoko mem ĉeestis la kunsidon, kaj krom entuziasman akcepton de la urbanoj, li promesis vastan apogon de la urbo al la organizado de la kongreso. Lige kun la UK en Bjalistoko en julio 2009 estas planata ankaŭ la malfermo de nova E-centro, en historia konstruaĵo kies renovigon la urba buĝeto pagos.

El nia leterkesto

– Antau ĉio mi deziras danki pro tre simpatia kaj interesa esperantista renkontiĝo en la klubejo de la Esperanto-Societo en Ŝikago. La etoso estis vere tre agrabla kaj internacia, ĉar fakte estis tie reprezentantoj de diversaj nacioj, kio ege plaĉis al mi, ĉar mi estas vera lingvoamanto kaj mi tre bone fartas en tiuspeca internacia medio. Malgraŭ tiel multaj nacioj mi ne povas diri, ke tio estis Babel-turo, ĉar sub tiu nocio oni komprenas la problemon kun miksitaj lingvoj kaj diversajn miskomprenojn kaŭze de tio. Ĉi tie regis nur unu lingvo kun nur kelkaj ŝercaj provoj de krokodilado. La prelego de d-rino Gertrude Novak pri la historio de la stratnomoj de Ŝikago estis por mi tre interesa, ĉar mi interesiĝas pri la etimologio de la vortoj, enkadre de tio ankaŭ pri la geografiaj kaj personaj nomoj. Interesa por mi estas ankaŭ la sistemo de numerado de la stratoj en tiel granda urbo, kia estas la Venta Urbo ĉe la Lago Miŝigan'. Ĉeokaze ni eksciis de prez. Viktoro, ke la plej longa en la mondo estas la tre proksima strato Western Avenuo. Ĉion plej bonan mi deziras al ĉiuj klubanoj de la Esperanto-Societo en Ŝikago!

Adamo Zabek, Tychy, Pollando

– Dankon pro la maja "Saluto!". Ĉiuj LESanoj legas viajn interesajn ĉefartikolojn kun granda intereso. La aprilan artikolon pri la famaj salminejoj en Pollando mi eĉ devis traduki al miaj bogefratoj (ne E-istoj), ĉar ili estis tie dum feria vojaĝo al Krakovo kaj ĉirkaŭaĵo.

Sonja Brun, Lucerno, Svisujo

Adreso (provizora)

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor' Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org/

Estraro:
Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZO

Membro-subtenanto ; $40 jare;
Familia membro : $30, Regula: $20
Studenta aŭ pensiula: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn, 828 S. Ada St,
Chicago IL 60607

KUNSIDO

okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

Jen la informo pri niaj sekvantaj kunsidoj:

22an de Junio, 12:00 – 7 ptm – tradicia pikniko okazos sur la korto de Roberto kaj Sepideh, 1315 Jeanette St., Des Plaines, IL 60018.
Kunportu vian preferatajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn. Preparu ion interesan por la kultura programo. Se pluvos, ni restos en la domo, nepre prenu pantoflojn.
Telefono de Roberto (847) 297-1976; Viktoro (773) 344-2276